Pendĝardenoj de Babilono

La Pendĝardenoj de Babilono (ankaŭ konata kiel la Pendĝardenoj de Semiramiso) kaj la muroj de Babilono (apud hodiaŭa Irako) estis konsiderataj kiel unu el la sep mirindaĵoj de la antikva mondo. Ili estis ambaŭ laŭlegende konstruitaj de Nebukadnecar la 2-a ĉirkaŭ 600 a.K.. Li verŝajne postulis la konstruadon de la ĝardenoj por plaĉigi sian edzinon Amjitis de Media kiu sopiris la arbojn kaj belajn plantojn de sia hejmlando. La densaj Pendĝardenoj estis amplekse priskribitaj de helenaj historiistoj kiel Strabo kaj Diodoro Sicila, sed krom tiuj rakontoj tre malmulte da pruvmaterialoj ekzistas. Fakte, neniaj ajn babilonaj priskribaĵoj pri la pendĝardenoj ekzistas.

Iuj eblaj arkeologiaĵoj de la elkavigado de la palaco de Babilono estis trovitaj, sed nenio tute pruvas ĝiajn fantaziajn priskribojn. Tra la epokoj, la loko eble estis konfuzita kun la ĝardenoj tie ekzistintaj ĉe Nineve, tial tabuletoj de tie klare montras ĝardenojn. Skribado en ĉi tiuj tabuletoj priskribas la eblan uzon de io simila al Arkimeda Ŝraŭbo por levi akvon al la bezona alteco.

Retpaĝo: www.traduki.de
Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Pendĝardenoj_de_Babilono